

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

3 APRIL 1978  
66-A JARKOLEKTO

ISSN 0014-0694  
FONDITA EN 1913

## Bara att välja!

Även i år kommer några hundra esperantoarrangemang att äga rum runt om i världen. Vi brukar i *La Espero* tala mest om de stora, traditionella arrangemangen, men då och då kommer vi ihåg även de andra.

Helt nyligen har *Monda Turismo* gett ut Turisma Esperanto-Kalendaro, en 40-sidig broschyr med beskrivning av 130 olika arrangemang av internationellt intresse. *Heroldo de Esperanto* har i ett av sina senaste nummer en liknande lista med 134 arrangemang. Tidningen *esperantos* lista, som upptar bara sommarmånaderna, räknar upp ett åttiotal tillfällen där esperantister från olika länder kan träffas under olika former. Någon lista över arrangemangen av mera lokalt karaktär finns tyvärr inte.

Det är inte bara fråga om kongresser och konferenser. De finns förstås med, från allmänna organisatoriska kongresser till konferenser för specialister (t ex ornitologer, världsmedborgare, lärare, järnvägsmän, kvinnor osv). En rad arrangemang är speciella för ungdomar, t ex sommarläger och arbetsbrigader, andra, ett flertal av dem, är av ren turistkaraktär. Man kan märka att antalet turistarrangemang ökat på senare tid, troligen just tack vare *Monda Turismos* tillkomst och samordning.

Till de mera ovanliga träffarna hör en under maj och juni i Polen, som håller på att utveckla sig till en kulturfestival. Olika teatergrupper (från Bulgarien, Finland, Frankrike, Polen och Sovjetunionen) kommer att presentera var sin pjäs. Vid samma tillfälle kommer också olika sånggrupper som sjunger på esperanto att framträda. Det ingår i ett program som har till ändamål att kartlägga vidden på esperantokulturen.

På sidan 23 hittar du en del av arrangemangen under juni och juli. Du blir förhoppningsvis inte förskräckt av den lilla stilen. Listan är tagen ur *esperanto* och vi har helt enkelt förminskat den för att få med så mycket som möjligt. Den listan upptar 2,5 sidor; så mycket plats har, tyvärr, inte *La Espero*.

De olika arrangemangen drar förstås olika mycket folk: från världskongressens över 4 000 väntade deltagare och TEJO-kongressens kanske 1 000 till 50 — 100 som är normalt för de flesta av dem.

## Du specialaj kursoj por perfektigi

### KIEL GVIDI KURSON?

Subite iuj en via urbo interesiĝas pri esperanto kaj demandas ĉu eblas lerni ĝin. Jes, esperanto estas facila. Ekzistas pluraj lernolibroj. Sed neniu lernas novan lingvon tute sola. Do: ĉu eblas aranĝi kurson? Jes, volonte, eĉ se nur 2-3 personoj partoprenas.

Kaj nun demando: kiu gvidos la kurson? Alia klubano estas instruisto, sed ne havas tempon. Vi mem eble havas tempon, sed ne scias kiel gvidi kurson.



En la aŭtuno 1978 okazos semajnfina kurso por tiuj, kiuj volas lerni la bazajn sciojn de kursgvidado.

La esperantoklubo de Jönköping preparas la aranĝon, kaj du esperantistoj kun spertoj pri kursgvidado prizorgas la enha-

von de la kurso. Dato: 18 — 19 de novembro.

Tiu ĉi kurso estas provo, kaj se estos sufiĉe da intereso pri ĝi jam nun, ni ripetos ĝin en la posta aŭtuno en alia loko.

Demandu jam nun en la klubo, kiu havos intereson partopreni! Pripensu ĉu la klubo kaso povos doni subvencion al tiu, kiu iros al la kurso!

### TRADUKI PRELEGON

Gasto venas al la klubo. La gasto ne parolas la svedan, sed prelegos en esperanto. La klubo kontaktas lernejon aŭ alian lokan asocion kaj proponas, ke la gasto iru ankaŭ al ili por prelegi. Jes, bonvenon, sed kiu tradukos al la sveda?

Malbona traduko povas fuŝi bonan prelegon. Sed bona edukado por interpretistoj de esperanto ne ekzistas.

Malgranda provo pri baza edukado estos en la semajnfino 20 — 21 majo 1978 en Stokholmo. Kursgvidanto estos Lenart Åberg. La kostoj de manĝo kaj instruado estos ĉ. 75 kr kaj la loĝigo estos plej eble simpla.

Pri tiu ĉi kurso kontaktu Svedan Esperanto-Federacion, Ulla Luin, telefono marde 18 — 20 horo: 08 - 48 99 76 (hejme 08 - 712 82 91).

Ulla Luin

## La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 00 Tyresö

Telefon: 08 - 712 82 91

I redaktionen: Sven Alexandersson, Åke Blomberg, Anita Lindblom, Geoffrey Sutton

Prenumeration 1978: 40 kronor per år, postgiro 20 12 - 3, Sv. Esperantoförbundet  
Tidningen utkommer med 8 nummer per år: i februari, mars, april, maj, september, oktober, november och december.

Manusstopp: den 10, månaden före utgivningsmånaden  
Sats: Esperantoförbundet  
Tryck: Sturetryckeriet, Stockholm 1978

## Esperantoförbundet

Postadress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Besöksadress: Högerv. 31

Telefon: 08 - 48 99 76

Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18 - 20.

Postgiro: 20 12 - 3

Medlemsavgift 1978: direktansluten medlem 50 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 25 kronor, familjemedlem utan tidning 15 kronor  
Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperanton* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år får dessutom ungdomsförbundets SEJUs blad *kip*.

## Esperantoförlaget

Postadress: Fack, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20 B

Öppettider: 1 sept - 15 maj: onsdagar kl. 10 - 11, torsdagar kl. 17 - 18

Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.

Telefon: 040 - 12 20 29

Postgiro: 578 - 5

Expedition: Anna-Greta Ströme

Medhjälpare: Wivi Nilsson  
Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

## Paneldebatten i Uppsala

Här kommer den information som vi inte fick avslöja i förra numret av *La Espero*: vilka som kommer att sitta i panelen under debatten den 22 april i Uppsala:

universitetsrektor **Torgny Segerstedt**

professor **Harald Riesenfeld**

överbibliotekarie **Gert Hornvall**

riksdagsman **Arne Gadd**

docent **Ebbe Vilborg**.

Debatten kommer att ledas av Karl Söderberg.

## Ett klipphäfte till klipparna

Alla som har sänt in klipp till Esperantoförbundet under 1977 kan få ett häfte på 30 sidor med en sammanställning av årets klipp ur svenska tidningar och tidskrifter.

Häftet innehåller en kort inledning med sammanfattning av de viktigaste ämnena för artiklar under 1977. Därefter följer en samling av elstencilerade klipp i urval, och sist en komplett lista över samtliga klipp.



Häftet *Ett urval klipp från 1977* är resultatet av samarbete mellan enskilda esperantister i hela landet, som sänt in artiklar i lokaltidningar och i tidskrifter. Arbetet med själva sammanställningen har gjorts av en grupp frivilliga: Karl Gustavsson, Milorad Ljubisavljević, Ingvar Schoultz, Franko och Ulla Luin.

Alla uppgifter i häftet är inte fullständiga, och det förekommer dessutom en del småfel.

# JES & NE

Det är bra om vi får kompletteringar, men det är också bra om fler hjälper till att klippa artiklar och sända dem till Esperantoförbundet. Ange både tidningens namn och datum på klippet!

De som sänt in klipp under 1977 bör höra av sig för att få sitt exemplar av häftet, eftersom ingen lista över medarbetarna finns.

## Gör dina brev vackrare!

Hur ser dina brev ut? Gör dem vackrare genom att sätta på dem vackra brevmärken för Världskongressen i Varna!

Vackert tryckta i guld och grönt kostar de bara 2,75 per blad (5,50 för tre blad).



Rekvirera så många du vill! Det gör du enkelt genom att be-

tala rätt summa på postgiro 14 74 29 - 5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö. Ange på talongen vad som avses med betalningen. För 27,50 får du sålunda 10 blad (med 10 brevmärken på), för 55 kr hela 30 blad, som du kan dela med dina klubbkamrater.

## Bona rikolto por traduka konkurso

La unua provo organizi tradukan konkurson estas nun prijuĝata de la jurio. Oni povas taksii la rezulton, almenaŭ laŭ kvanto, kontentiga. La poeziaj tradukaĵoj enhavas verkojn de Gustaf Fröding, Ernst Josephson, Karl A. Tavaststjerna, Artur Lundkvist, Hjalmar Gullberg, Dag Hammarskjöld, Evert Taube kaj Robert Graves (la lasta ne estas sveda verkisto).

Ankaŭ la prozaj kontribuoj apartenas al konataj verkistoj: Frans G. Bengtsson, Tage Danielsson, Vilhelm Moberg, Viktor Rydberg, Albert Viksten kaj Herta Wirén.

Ni povas ankaŭ informi, ke kontribuoj venis ankaŭ el aliaj landoj, eĉ el Usono!

Oni atendas senpacience la rezulton, kiu estos diskonigita dum la jarkongreso de SEF en Uppsala.

**SPECIALERBJUDANDE**  
till deltagarna i Esperantoförbundets årskongress i Uppsala!

Den nya esperantoskivan

## TRA L'MONDO

med sånger och visor från skilda länder  
sång av **Olivier Tzaut**  
säljs i begränsat antal under kongressen i Uppsala

**SPECIALPRIS 81 KR**  
(ordinarie pris 88 kr)

Moms 20,63% är inräknad i priset.

*Du kan, som vanligt, köpa ett varierande urval av ny och äldre litteratur.*

**ESPERANTOFÖRLAGET**  
Fack, 200 42 Malmö

## La disko plaĉis al Sveda Radio

*Tra l'mondo*, la nova esperanto-disko kun kantoj de Olivier Tzaut plaĉis al la Sveda Radio!

Nur kelkajn tagojn post la ricevo ili dankis pro la sendita disko kaj mendi pluajn du, kontraŭ pago. Eble tio igos vin akcepti la specialan oferton de Eldona Societo Esperanto, kiu validas je la kongreso en Uppsala.

## Gustavo subite alvenis al Svedio

Ĉu vi memoras Gustavon, la esperantiston el Ĉilio, kiu devis kaŝi sin dum pluraj jaroj pro politika persekuto kaj dum tiu tuta tempo ne povis renkonti sian familion? Unu semajnon antaŭ pasko li tute subite aperis en Stokholmo.

Antaŭ unu jaro li havis azilon en la ambasadejo de Ekvadoro en Santiago. De tie la ambasadejo helpis lin flugi al Ekvadoro, kie lia vivo ne plu estis en danĝero, sed kie li vivis en tre mizeraj cirkonstancoj. I a oni lin malliberigis tuj kiam iu ĉilia politikisto vizitis Ekvadoron, kaj tio okazis ofte.

Plurajn fojojn li provis ricevi permeson vojaĝi al Svedio, kie

kelkaj esperantistoj kolektis monon por pagi flugvojaĝon al li kaj lia familio, tiel ke ili povu kuniĝi denove. Tion oni rifuzis al li. La lastan fojon la peton sendis la sveda ambasadoro, kiu priskribis, en kiaj kondiĉoj Gustavo vivas. Ankaŭ tiun peton sekvis rifuzo. Tiam knabino loĝanta en la ĉefurbo de Ekvadoro kaj laboranta tie por la sveda ĉilia komitato sendis protestan telegramon al la enmigradaj aŭtoritatoj en Norrköping. Rezulte de tio Gustavo tute subite ricevis la permeson kaj la flugbileton.

Nun li troviĝas en kursejo por lerni la svedan lingvon.

Bonvenon al Svedio, Gustavo!

## Nova posedanto de Dansk Esperanto-Forl

Dansk Esperanto-Forlag ne plu apartenas al L. Friis. Ekde aprilo ĝin posedas Bent Holm-Laurson en Århus.

L. Friis fondis la eldonejon en 1932 kaj sukcesis eldoni centon da diversaj titoloj. Pro aĝo kaj malpli bona sanstato li devis nun rezigni sian entreprenon.

Oni atendas, ke Holm-Laurson daŭrigos la viglan aktivecon. La nova adreso de la eldonejo estas Sdr. Allé 29, DK-8000 Århus, Danlando.

# HODIAŬ

## Ankaŭ la neesperantistoj bezonas niajn informojn

*Telefonis iun tagon studento, kiu preparas tezon pri la rolo de la angla lingvo. Li ne rakontis, kiom ampleksa aŭ ambicia estos tiu tezo. Li telefonis al SEF, ĉar li vidis en la stacidomo de Stokholmo unu el la afiŝoj, kiujn SEF eldonis (la unua en la serio de sep flavaj afiŝoj), kun la jenaj esprimoj:*

*«Multaj kredas, ke la angla lingvo estas la plej granda lingvo de la mondo. Ĝi ne estas. La plej granda lingvo estas la ĉina. Pli ol 700 milionoj da homoj parolas ĝin. 20 procentoj de la monda loĝantaro. Pli ol duoble tiom, kiom tiuj, kiuj parolas la anglan. La kvoto de anglaparolantoj cetere malkreskas.»*

*Pri la lasta frazo li ŝatus havi pli da materialo. Kaj tuj leviĝis la eterna dilemo de ni esperantistoj, ke ni havas informojn, ofte eĉ abundajn tiajn, sed plej ofte ne ordigitaj kaj nur en esperanto. Multas la artikoloj pri lingvaj problemoj kaj pri la rolo de la angla lingvo en internaciaj rilatoj, en esperanto, sed tiuj artikoloj ne estas atingeblaj al la neesperantistoj.*

*Kaj kion fari al tio? Ĉiu el ni kuras al sia privata arkiveto, fosas en ĝi dum duona tago kaj eble trovas ion, eble ne. Kaj se ni trovas, tion kion ni serĉis, restas la laboro traduki, kompili, redakti; kaj tiu laboro prenas ankoraŭ unu tagon.*

*Ĉu ne eblus fari tion pli sisteme, pli ordigite? Ĉu ni ne havu iun centron, iun servon, kiu organizu tiun laboron? UEA havas CED, kiu plenumas tiun taskon; ĉu ni eble havu iun CED-S, multe malpli ambician, malpli vastan? Iun CED-S, kiu estu laŭ la mezuro de niaj bezonoj.*

*Estas facile diri jes al tia demando. Sed ni devas memori, ke fine ne temas pri decido, ke iu faru, sed pri libervola elekto de iu aŭ iuj, ke ili faros. Same kiel pri ĉiuj aliaj taskoj en nia movado. Kaj oni devas ankaŭ memori, ke temas pri longdaŭra, teda, sistema laboro kolekti kaj kolekti kaj kolekti, laboro, kiu malofte rezultigos konkretajn rezultojn kaj ankoraŭ pli malofte donos honoron al tiu aŭ tiuj, kiuj faros ĝin.*

*Sed ni bezonas tian servon. Restas nur la demando, kiel realigi ĝin.*

Franko Luin

## EXTRA! EXTRA!! EXTRA!!!

Behöver du bara hjälp med flyg till Varna och vill själv ordna mat och logi? Då ska du läsa här! Du kan följa med SEFs kongressresa och betalar bara

från Stockholm 1125.— från Köpenhamn 925.—

I priset ingår flyg tur och retur, buss från flygplatsen till Varna och från Varna till flygplatsen. Samma avgångstider gäller som för resande som beställer kongressresan med logi och mat, alltså

från Stockholm söndagen den 23 juli  
till Stockholm söndagen den 6 augusti

från Köpenhamn måndagen den 24 juli  
till Köpenhamn måndagen den 7 augusti

Planen till Varna avgår tidigt på eftermiddagen (mellan kl. 13 och 14) och kommer tillbaka ungefär vid samma tid på dygnet. Du är framme i Varna på kvällen.

Om du ska beställa bara resa kan du anmäla dig till den 5 maj. Men skicka helst din anmälan lite tidigare. Du kan anmäla dig helt enkelt genom att betala 300 kr till pg 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö. Om du vill teckna avbeställningsskydd lägger du till 35 kr. Den resterande summan betalar du senast den 31 maj.

Om du vill ta med dig någon som inte tänker vara med på kongressen, ta honom med utan problem.

**Obs! Varken i dessa priser eller i priser för den kompletta kongressresan finns den nya charterskatten med. 40 kr tillkommer för dem som reser från Köpenhamn och 100 kr för dem som reser från Stockholm.**

(Glöm inte anteckna på talongen vad betalningen avser och varifrån du vill flyga.)

# Varno en marto ne estas Varno en julio, sed...

Ne, Varno en marto ne similas al Varno en julio-aŭgusto. En marto la naturo ankoraŭ ne surmetis la plenvendon de la somero, la turistoj ĉeestis nur en minimuma nombro. Sed Varno estis tie, la hoteloj apude, la banstrandoj kaj la palaco en kiu okazos la Universala Kongreso de Esperanto.

Okazis, ke mi faris rapidviziton al Varno en marto, tuj antaŭ pasko. Estis malvarma Varno, kiun mi renkontis, kun blovo kaj eĉ neĝo. Sed la semajnon antaŭe kaj la semajnon poste la temperaturo atingis 15-20 gradojn; kaj tion oni povis rimarki je la naturo. La arboj ankoraŭ ne verdiĝis, sed iliaj burĝonoj jam malfermiĝis. La plej rimarkinda signo pri printempo tamen estis la fruktarboj, kiuj plene floris en diversaj nuancoj de blanko, helruĝo kaj ruĝo, i a persikoj kaj abrikotoj. La herbo verdiĝis bele kiel nur nova printempa herbo povas verdi, kaj en ĝi kelkloke floris tutaj tapiŝoj da odorvioleoj kaj, aliloke, da muskarioj, kiuj evidente kreskas sovaĝe tie. Jen kaj jen videblis florantaj leontodoj kvazaŭ etaj sunoj en la herbo. [Hejme en Tyresö mi forlasis duonmetron da neĝo kaj dek gradojn da malvarmo, do vi komprenos mian ĝuon pri tiuj printempaj signoj.]


Ĉion ĉi mi vidis ne en Varno, sed dum promeno de Druĵba al Zlatni Pjasaci (ili ambaŭ troviĝas norde de Varno) dum la paska vendredo. Tiam la suno jam regajnis sian forton kaj estis agrable piediri la dek kilometrojn sur la vojo, kiu sekvas la marbordon. Je unu flanko, iom sub la vojo, estis la maro kun la longaj sablaj strandoj; je la alia, iom super la vojo, kampoj kun vinberejoj kaj fruktarboj.

Kaj mi iris en Zlatni Pjasaci. Mi promenis en la sablo tuj ĉe la akvorando, sablo, kiu ne bezonis esti purigita post la vintro; kaj mi promenis sur la vojoj inter la hoteloj kaj sur ŝtonkovritaj padoj en la arbaretoj inter ili. La hoteloj en Zlatni Pjasaci ne ĉiuj situas ĉe la maro en longa vico (kelkaj ankaŭ situas tie), sed sur la dekliveto, kiu komeciĝas preskaŭ ĉe la maro, ĉirkaŭata de arboj kaj herbejoj. Inter ili troviĝas butiketoj, restoracioj, poŝtoŝtupo kaj alio bezonata

al turistoj; ne ĉio koncentrita en unu centron aŭ al unu strato.

Mi ankaŭ iris en Varno, sola kaj en akompano de esperantistoj. Mi vizitis la kongresejon kaj preskaŭ mirgapis en ĝi. Se ĝi imponas jam de ekstere pro sia formo, despli ĝi faras de interne. Kiam mi vizitis ĝin, ĝi estis aranĝita por konferenco okazonta la postan tagon. Tio donis bonan bildon pri ĝia aspekto dum la Universala Kongreso. Mankis en ĝi la homoj (oni atendas pli ol 4 000 partoprenantojn), sed ne mankis loko por ili.

Tuj ekster la kongresejo etendiĝas la ĉemara parko. Oni iras nur trans la straton kaj estas en ĝi. Tute certe ĝi estos populara promenejo por la esperantistoj dum la kongreso. Kaj tuj sub ĝi oni povas bani sin en la Nigra Maro. Salto en la akvon inter vizito al du kunsidoj aŭ prelegoj estos tute facile aranĝebla.



La bildo montras la modernan kongresejon de la UK de Varno kaj la loĝkvartalojn, kie troviĝas la privataj ĉambroj.

Kaj mi renkontis esperantistojn en Varno. Mi malfacile povas priskribi la varmecon kaj simpation, kun kiu ili renkontis min. Mi vizitis ilin en iliaj hejmoj kaj eĉ en vinkelo. (Ĉu vi povas imagi al vi vinkelon en 10-etaĝa moderna domo meze en Varno? Ekzistas!) Unu el ili, la sekretario de LKK, esprimis sin: «Mia dometo estas malgranda, sed mia koro granda.» Jes, vere! Kaj tion oni povos certe sperti ankaŭ dum la Universala Kongreso.

Varno en marto ne estas Varno en julio, sed tamen...

Franko Luin

# Från *La Espero* 1913: tankar som håller än

Vi fortsätter att bläddra igenom *La Espero* för 1913. I aprilnumret hittar man förslag för nya stadgar för Esperantoförbundet. Man återfinner många av formuleringarna i detta förslag även i dagens stadgar. Men man märker också, att det var fråga

mänheten uppfattar emellertid de mellanfolkliga förbindelserna endast som meddelanden inom en större eller mindre grupp av särskilda verksamhetsområden. I fråga om hjälpspråkssaken tänker man således exempelvis endast på diplomati,



om en betydligt svagare esperantorörelse i Sverige på den tiden. Några exempel om det:

«Varje till förbundet ansluten Esperantoförening och varje enskild förbundsmedlem, ordinarie som befrämjande, erhåller utan särskild avgift förbundets

handel, vetenskaper, olika internationella kongresser och utställningar, eller på arbetarrörelsen och internationella sammanslutningar för stödjande av speciella idéer, d.v.s. man beaktar vanligen det internationella livet uteslutande i de former, vari det sedan lång tid tillbaka befunnit sig. Det är visserligen självklart, att ett allmänt införande av Esperanto skulle vara synnerligen förmånligt för alla dessa verksamhetsområden, men vi böra ej förbise, att man för dessa förbindelser redan besitter jämförelsevis goda, ehuru ej alltid tillfredsställande medel.»

«Endast så småningom kan vårt språk intränga i de kretsar, där man redan före Esperantos framträdande kunde någorlunda göra sig ömsesidigt förstådd trots olikheterna i språk. Ju mer Esperanto vinner utbredning, desto mer kommer det att användas för handel o.s.v., men handel eller industri kunna ej tjäna såsom föregångare i användandet av Esperanto.»

«Språket har använts för meddelanden mellan personer av olika nationer; ofta ha dessa förbindelser lett till personlig vänskap. På så sätt har så småningom uppstått ett allt större och större antal förtroliga mellanfolkliga förbindelser, för vilka Esperanto är ett nödvändigt medel. Hundratusentals vänskapsband betrygga vårt Esperanto fortfarande tillvaro, och detta så mycket mera, som erfarenheten visat, att Esperanto för allmän praktisk användning är så fullkomligt som möjligt, och att man således ej ens kan tänka sig möjligheten av att ett bättre hjälpspråk någonsin skulle kunna uppstå.»

officiella organ i den mån detta utkommer.»

«Förbundet håller, om möjligt, varje år allmänt möte...»

Sådana formuleringar saknas i de nuvarande stadgarna. Det är självklart att förbundets officiella organ ska komma ut och att förbundet ska hålla sin årskongress varje år.

Men låt oss citera ur detta nummers ledare, som heter «Förutsättningarna för ett hjälpspråks utbredning».

«Meningen med Esperanto är, att detta språk skall tjäna som medel för mellanfolklig samfärdsel. Den större delen av all-

# Ni naturpromenas dum dua leciono




Ni daŭrigas nian serion pri ĈIUTAGA ESPERANTO per promeno en la printempa naturo. Ni renkontas en ĝi kelkajn plej konatajn florojn. Se vi ne ankoraŭ konas ilin, jen ebleco konatiĝi!

Vi ne bezonas esti biologo por interesiĝi pri la naturo ĉirkaŭ vi. Kian nomon havas la diversaj graminaj kiuj, ĉefe, konsistigas la herbon estas eble demando por fakuloj. Sed apartenas al la ĝenerala kulturo, ankaŭ esperanta, rekonu la arbojn kaj la florojn, kiujn ni renkontas dum niaj promenaj; almenaŭ la plej oftajn inter ili. Ni konatiĝu kun kelkaj el tiuj, kiuj estas plej karakterizaj por printempo kaj la frua somero.

La floro, kiun vi plej frue trovas apud la vojoj kaj sur ne plu kulturataj kampoj estas **tusilago** (*tussilago farfara*; *hästhov*). Eble vi jam vidis ĝin ĉijare, se vi loĝas ie en suda Svedio. Ĝiaj floroj iom similas al leontodaj, sed ili estas pli malgrandaj kaj pli pale flavaj. Unue venas la floroj, kiam la ceteraj kreskaĵoj ankoraŭ ne verdiĝis. Kiam la floroj estas jam for, aperas la folioj, renformaj, kiuj povas fariĝi tre larĝaj.

aŭtuno. La floroj, stelformaj, havas bluan koloron. La folioj malsimilas la foliojn de la aliaj anemonoj kaj estas iel tripintaj.

**Blanka anemono** (*anemone nemorosa*; *vitsippa*) estas la plej ofta el la anemonoj. Ĝi povas tute kovri la grundon sub la arboj en ne tro densa arbaro. La floroj estas, kompreneble, blankaj kaj stelformaj. (PIV klarigas ke anemono estas senpetala plujara herbo, kies sepaloj estas okulfrapaj, ofte brilkoloraj. Tio estas eble pli scienca klarigo). Tre simila, sed flavkolora, estas **flava anemono** (*anemone ranunculoides*; *gulsippa*), kiun oni trovas en suda Svedio, ofte kune kun la blanka anemono.



Tutcerte vi konas la florojn, kiuj nomiĝas anemonoj. Ekzistas pluraj el ili, kaj ili diferencas kaj laŭ koloro kaj laŭ formo.

**Hepatiko** aŭ **blua anemono** (*anemone hepatica*; *bläsippa*) estas la plej frua el ili kaj ekfloras tuj kiam la frosto malaperis el la tero. Ĝiaj burĝonoj atendas la printempan sunon ekde la

**Pulsatilo** (*pulsatilla vulgaris* aŭ *anemone pulsatilla*; *backsippa*) ankaŭ estas anemono. Ĝi estas malpli ofta (do kelkloke protektita) kaj kreskas sur herbaj deklivoj en suda kaj meza Svedio. La floroj estas pli grandaj ol tiuj de la blanka anemono, la sepaloj turnitaj supren, violkoloraj.

Violkolora estas ankaŭ alia el la printempaj floroj, la **violo** (*viola*; *viol*). Ekzistas pluraj variantoj de ĝi kaj ofte estas malfacile distingi inter ili. La floroj de ili estas ofte neregulaj (du petaloj supren, tri suben), ilia

koloro plej ofte viola, sed **trikolora violo** (*viola tricolor*; *stymorsviol*), kiu kreskas sur seka sabla tero, havas ankaŭ blankan kaj flavan kolorojn apud la viola. Ekzistas, cetere, ankaŭ nur blankaj aŭ nur flavaj violoj. La violo konata pro sia bonaodoro estas *viola odorata* (*luktviol*).

Alia floro, sen kiu printempo estas nepensebla, estas **primolo** (*primula veris*; *gullviva*). La latina nomo signifas, ke ĝi floras kiel la unua floro de la printempo. Tio ne estas vera, sed ĝi eble pli ol la aliaj floroj signifas la definitivan alvenon de la printempo. La folioj estas rozete aranĝitaj ĉe la bazo kaj la floroj brile flavaj en umbeloj aŭ grapoloj. Krom *primula veris*, kiu estas la plej konata en Svedio, ekzistas aliaj primoloj, kiuj diferencas laŭ sia kresk- kaj flormaniero.


En malsekaj regionoj, apud lagoj kaj riveretoj, kreskas **kalto** (*caltha palustris*; *kabbeleka*), flava floro, simila (laŭ la floro) al flava anemono aŭ ranunkolo, sed pli granda. La folioj estas renformaj kaj brilaj.

flava floro kun ok longaj petaloj, trovebla en malfermitaj arbaroj kaj ofte laŭlonge de la vojoj. Alia tre konata ranunkolo apartenas pli al la somero. Tio estas la 'butterfloro' (*smörblomma*).

**Konvalo** (*convallaria majalis*; *liljekonvalj*) ne apartenas al la plej fruaj printempaj floroj, sed certe al printempo. Ĝi havas ebenrandajn foliojn kaj kruĉformajn blankajn floretojn en unuflanka spiko; ĝi tre forte kaj bone odoras. Oni trovas ĝin en maldensaj arbaroj, ĉe la arbarandoj kaj kelkfoje sur herbejoj.

## Eta vortolisto

gramino *gräs*  
 grapolo *klase*  
 herbo *ört*, *gräs*  
 kapitulo *blomkorg*  
 petalo *kronblad*  
 renforma *njurformad*  
 sepalo *foderblad*  
 spiko *ax*  
 tigo *stjälk*  
 umbelo *blomflock*



- 1 konvalo
- 2 pulsatilo
- 3 tusilago
- 4 hepatiko
- 5 fikario
- 6 oksalido
- 7 bl. anemono
- 8 antenario
- 9 kalto
- 10 primolo

Oni ne povas ne mencii, eĉ ne en tiel supraĵa artikolo kiel tiu ĉi, **leontodon** (*taraxacum vulgare*; *maskros*), la defion al multaj ĝardenistoj kaj ĝojon al aliaj, kiuj ĝuas ĝian sunkoloran flavon en la herbejoj. La folioj kreskas el la bazo kaj estas runcinataj, la floroj kolektitaj en granda flava kapitulo (ĉio laŭ PIV).

Malpli okulfrapa, sed tre ofta en arbaroj en frua printempo, estas **oksalido** (*oxalis acetosella*; *harsyra*). La folioj similas al tri renversitaj koretoj; la floro estas blanka kun ruĝecaj strioj. La tuto estas tre malalta.

El ranunkoloj pluraj floras frue printempe, ekzemple **fikario** (*ranunculus ficaria*; *svalört*),

Mi ne povas ne mencii unu el miaj favoritoj, trovebla ĉie en Svedio en sekaj herbejoj. Ĝi estas **antenario** (*antennaria dioica*; *kattfot*), malgranda kreskaĵo kun lanugaj tigoj kaj floroj. Laŭ koloro ĝi povas esti blanka aŭ helruĝa. La nomo 'katpiedo' donas bonan imagon pri ĝia 'moleco'.

Jen kelkaj el la floroj, tute hazarde elektitaj. Ne kredu nun, ke vi povas uzi *La Esperon* por botanikumi en la naturo. Por tio vi bezonas libron pri sveda flaŭro. Sed eble vi lernis kiel kelkaj el la floroj en tiu flaŭro-libro nomiĝas en esperanto.

Franko Luin  
21

# Till förlaget och dig: en utmaning

Hur letar man upp några bra böcker ur förra årets utgivning? Har man 5 000 kronor så är saken enkel: man köper rubbet och tittar efter själv. Esperantoböcker är billiga, och för den summan får man 160 böcker i de mest varierande former: från stencilerade små häften till snyggt bundna tegelstenar på närmare 1000 sidor.

Om man i stället ska välja ut ett 20-tal av de bästa böckerna, så kan man gruppera dem i tre huvudgrupper: lätta böcker, facklitteratur och klassisk litteratur.

## LÄTTA BÖCKER

Två bra böcker kom ut i omtryck 1977: dels *Koko krias jam* av Ferenc Szilagyí med noveller och dels *Kiel akvo de l'rivero* av Raymond Schwartz. Båda är kända och älskade esperantoförfattare. Många av Szilagyí's noveller används gärna i fortsättningskurser, och han var själv medveten om behovet av lättläst litteratur och medverkade i antologier och läroböcker.

Boken av Schwartz är en roman med självbiografisk bakgrund: en ung fransman ger sig av till Tyskland strax före krigsutbrottet 1914, träffar en flicka, men återfinner henne först efter många år.

Två böcker är översatta från danska, i en serie från Dansk Esperanto-Förlag, som försöker göra modern dansk litteratur mera känd. Vi i Sverige är ofta väldigt ovetande om danska böcker, medan det danska förlaget är väl medvetet om behovet av sådana. *Venis viro* av Torben Jensen är en berättelse om en man som letar efter den som mördat hans son i en idyllisk dansk stad vid havet. *Gudrun* är en kärleksroman av nobelpristagaren Johannes V. Jensen.

En japan har översatt ett av den tyska litteraturens mest kända verk: *Tonio Kröger* av Thomas Mann. Boken är anorlunda än det övriga som Thomas Mann skrivit. Det är en lyrisk, vemodig berättelse, inte särskilt lång, och översättningen är fin.

Böckerna om Zamenhof har länge varit utsålda, men i slutet av 1977 kom en nyttgåva av *Vivo de Zamenhof* av Privat. Den här boken hör till dem som

man helt enkelt bör känna till, den är skriven i en lätt stil, en ännu romantiserande.

## FACKLITTERATUR

Språkvetenskap är något som intresserar många esperantister. I Zagreb är man modig, och har gett ut en samling föredrag från ett symposium: *Internacia Lingvistika Simpozio Kumrovec 1975*, med intressanta bidrag om olika aspekter av språkvetenskap idag, särskilt med tonvikt på internationella språkproblem.

För den aktive esperantisten kom ut två andra viktiga publikationer förra året, dels *Dua*



*manlibro de varbado* av G. Conrad och dels en andra upplaga av *Pri internacia lingvo dum jarcentoj* av I. Dratwer. Conrad skriver vardagsnära och praktiskt om information. Dratwers samling av citat från kända personligheter har kompletterats och ungefär fördubblats. Här ingår bl a ett citat av Olof Palme.

Från SUK, dvs Someraj Universitataj Kursoj, kommer en vårbäck av texter med introduktion till olika vetenskaper. Som exempel kan nämnas *Origino de la vivo de biokemiaj vidpunktoj* av professor S Kawamura i

Japan, ett ämne som borde intressera fler än bara dem som pluggar det.

På ett annat plan ligger utgivningen från det religiösa IKUE-centro i Rom, med bl a *Francisko el Asizo — profeto por nia tempo*.

## KLASSISK LITTERATUR

Flera av världslitteraturens mästerverk har kommit ut i översättning till esperanto under 1977. Det mest iögonfallande är väl *Don Quijote*, en välkänd tegelstensroman från 1500-talets Spanien. Det är väl tveksamt om många kommer att läsa hela boken, men den duger att läsa avsnitt ur också, varför inte vid nästa höstföreläsning.

Översättningen av *Frithiofs saga* har rönt för lite uppmärksamhet i Sverige. Recensionerna har ansett översättningen tung och lite klumpig. Å andra sidan är boken idealisk för en svensk, eftersom den svenska texten finns parallellt med esperantotexten.

Ett verk som i Sverige är okänt är den estniska boken *La mastro de Korboja* av A. H. Tammsaare. Det är en episk roman om tiden mellan 1870 och 1930. Estland ligger så nära oss, det finns en stark estnisk minoritet i Sverige, och i Estland finns historiska minnen av svenskar som vi i Sverige inte vet eller inte vill veta. Estlands litteratur borde inte behöva vara okänd här.

Nietshes *Tiele parolis Zaratuŝtra* är ett känt filosofiskt verk, omdebatterat ända sedan det kom ut första gången 1883. Nu finns det alltså i översättning till esperanto.

Som klassisk litteratur får väl också anses *Rimleteroj* av de två mest kända nutida esperantopoeterna: Marjorie Boulton och William Auld. Trots att boken är poesi, finns den med bland de tio mest sålda böckerna förra året.

## EN UTMANING TILL ESPERANTOFÖRLAGET

Låt oss se verkligheten i ögonen: det är krångligt och tidsödande att skaffa esperantoböcker. Det beror på många saker: esperantisterna är få, de är utspridda över hela jordklotet, det tar tid att skicka en bok från Japan till Sverige, tullbehandlingen och uträkning av moms på paketen är krånglig, det finns inte pengar att investera i att ta hem lager av bra böcker och riskera att de inte säljs.

Esperantoförlaget i Malmö har funktionen som «libroservo» vid sidan av sin verksamhet som bokförlag. För närvarande är

det «libroservo» som är den viktigaste verksamheten: ta in böcker från andra förlag och sälja dem till esperantister i Sverige.

Jag utmanar Esperantoförlaget på att göra ett försök att sälja de här 15 - 20 bästa böckerna ur förra årets utgivning.

Gör det lätt för kunderna att beställa, samla böckerna i «paket», tala om hur lång tid det tar att få hem alla böckerna i «paketet».

## EN UTMANING TILL BOKKÖPARNA

Ska vi ha någon esperantokultur i framtiden, måste vi se till att få ut de nya böckerna, åtminstone de bästa nya böckerna, i klubbar och hos enskilda esperantister. Titta på verkligheten: Esperantoförlaget måste få en rimlig chans att fortleva, att förenkla sina rutiner, att förbättra sin lönsamhet, för att kunna ge ut nya böcker i Sverige, att få utnyttja rabatter som utländska förlag kan ge vid samlade beställningar.

Esperantoböcker är billiga. Ett bra bokpaket, till exempel med lätta böcker, facklitteratur eller klassisk litteratur ur 1977 års utgivning, kostar inte mer än 200 - 300 kronor: ett besök i snabbköpet för en familj.

Någon måste köpa de nya böckerna, och hitta på hur man kan använda dem: läsa själv, sätta upp ett klubb-bibliotek eller en privat boksamling, lotta ut böcker på «bokens dag» i december, lämna som uppmuntran till kursdeltagare, ge bort som present till brevvänner och andra.

Ulla Luin

## VÄRLDSKONGRESSEN VARNA 1978

Avgifter till 15 juni 1978:

1 Icke medlem i UEA	385
2 Medlem med årsbok	340
3 Medlem med årsbok och tidn. «Esperanto»	280
4 Make/maka till (1)	275
5 Make/maka till (2) eller (3)	245
6 Ungdom t o m 20 år	120
7 Universitetsstuderande t o m 30 år	195
8 Synskadad	155

Upplysningar och blanketter hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27d, 217 53 Malmö (tel. 040-6 52 09).

Betalningar till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö.

# Elektu inter la jenaj someraj aranĝoj

## Junio

- 01 - 04 Migrado "Tra montoj kaj valoj", Bulgario (Monda Turismo, Pf. 45, BG-1000 Sofia)
- 01 - 04 Internacia E-Renkonto, Bydgoszcz, Pollando (Juventur, adreso supre)
- 02 - 16 kaj 16 - 30 Nigramara E-Feriado, Nesebar, Bulgario (BEA, Pf. 30, Smoljan)
- 03 - 04 Trilanda Renkontiĝo (Nederlando-Belgio-Germanio), Aachen, FR Germanio (P. Firmenich, Jahnstr. 5, D-5190 Stolberg)
- 03 - 04 Semajnfino por infanoj kaj geknaboj, La Chau-de-Fonds, Svislando (Svisa E-Junularo, 18 Verger Rond, CH-2000 Neuchâtel)
- 03 - 10 Migradtagoj, Edlach, Aŭstrio (Monda Turismo, Stieberg, 6/22, A-1150 Wien)
- 04 - 07 Etnografia Renkonto, Toruń, Pollando (Juventur, Jagiellońska 12, PL-85 067 Bydgoszcz)
- 05-11, 12-18, 19-25 kaj 26-02/7 Buslinio "Esperanto", Pollando-Hungario-Ĉeĥoslovakio (Juventur, Jagiellońska 12, PL-85 067 Bydgoszcz)
- 10 - 11 TANEF-Migrado, Rielig/Fluelen, Svislando (M. de Sassi, Nordstr. 123, CH-8037 Zürich)
- 10 - 20 Buslinio "Esperanto", Hungario-Pollando (Juventur, adreso supre)
- 12 - 17 Internacia Studsemajno, Ylitornio, Finnlando (Internacia Studcentro, SF-17300 Vääsäy)
- 17-27 kaj 24-04/7 Buslinio "Esperanto", Hungario-Pollando (BTK de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)
- 22 - 29 Feriado por Popolmejnanoj, Znin, Pollando (Juventur, adreso supre)
- 24-07/7 11a Pionira Internacia Tendaro, Zánka, Hungario (HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)
- 25-16/7 Internacia Laborkampado, Mezőtúr, Hungario (Művelődési Központ, Petőfi u. 5., H-5400 Mezőtúr)
- 29-06/7 Feriado por Popolmejnanoj, Tuczno, Pollando (Juventur, adreso supre)

## Julio

- 01-20 Kurso por E-Instruistoj, Bydgoszcz, Pollando (Juventur, adreso supre)
- 02 - 08 16a Somera E-Universitato, Gyula, Hungario (TIT-SEU, Pf. 73, H-5701 Gyula)
- 02 - 15 Somera E-Tendaro (por infanoj 10-15-jaraj), Lančov, Ĉeĥoslovakio (Loka grupo de ĈEA, CS-674-01 Třebíč)
- 02 - 23 Skolta Tendaro "AGORA", Wronczyn-Pobiedziska, Pollando (P.R. Janowczyk, Hibnera 6A/4, PL-60 224 Poznań)
- 02-26/8 Internacia Feria Alitlernejo (semajnaj kursoj), La Chau-de-Fonds, Svislando (KCE, Postiers 27, CH-2300 La Chau-de-Fonds)
- 03 - 04 Kongreso de KLEG, Kansajo, Japanio (Kansaja Ligo de E-Grupoj, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka, Oosaka-hu, 561 Japanio)
- 03 - 09 Buslinio "Esperanto", Pollando-Ĉeĥoslovakio-Hungario (Juventur, adreso supre)
- 03 - 20 3a Skolta E-Tendaro, Aŭgustova Lagaro, Pollando (Kom. Chor. ZHP, 22 Lipca 7, PL-16 400 Suwałki)
- 03 - 22 Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 06 - 13 Feriado por Mezlernejnanoj, Swiecie, Pollando (Juventur, adreso supre)

- 06 - 16 Internacia Studsemajno, Vääsäy, Finnlando (Internacia Studcentro, SF-17300 Vääsäy)
- 09 - 22 Somera E-Lernejo, Košcke Hamre, Ĉeĥoslovakio (M. Zvara, Leninovo Nabr. 29, CS-05 801 Poprad)
- 10 Virina Renkontiĝo, Budapeŝto, Hungario (HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest)
- 13 - 20 Feriado por Mezlernejnanoj, Janikowo, Pollando (Juventur, adreso supre)
- 14 - 16 27a Hungarlanda E-Kongreso, Budapeŝto, Hungario (HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)
- 15 - 21 51a Kongreso de SAT, Lectoure, Francio

## RADIO

# Tiujn ĉi staciojn vi kaptas plej facile

Ni esperas, ke vi daŭre kaj atente aŭskultas la radiodissendojn en esperanto. Jam pasis longa tempo depost kiam ni publikigis la liston pri radioj, kiuj estas kapteblaj en Svedio. Kelkaj informoj ŝanĝiĝis, kelkaj stacioj aldoniĝis. Do jen la nova listo. Tiun ĉi, same kiel la antaŭan, preparis Jan-Olof Svensson el Tidaholm.

Post la nomo de la stacio aperas kurzive la tempoj de la dissendo kaj poste la ondlongo/frekvenco.

## ĈIUTAGE

**Varsovio** 06.00 — 06.30: 200/1502 75,85/3955 50,04/5995 48,90/6135 41,27/7270  
16.30 — 16.55: 41,99/7145 31,45/9540  
22.30 — 22.55: 200/1502 75,85/3955 50,04/5995 41,27/7270

- (OKK-Esperanto, F-32700 Lectoure)
- 16 - 29 Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio (Loka grupo de ĈEA, CS-674-01 Třebíč)
- 17 - 22 Latin-Amerika Kongreso de Esperanto, Marília, Brazilo (Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Caixa Postal 1887, BR-20000 Rio de Janeiro)
- 17 - 26 11a Internacia Renkontiĝo Naturamika, Abaliget, Hungario (TK de HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)
- 21 - 25 26a Kongreso de ELNA, Milwaukee, Wis., Usono (ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530)
- 22 - 23 20a Kongreso de Kanada E-Asocio, Milwaukee, Wisconsin, Usono (ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530)
- 22 - 29 Internacia E-Radio de IEKA al Varna (IEKA, J. Guillaume, 66 de Grasse Village, F-78810 Feucherolles)
- 22 - 29 34a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Veliko Tarnovo, Bulgario (LKK, Pf. 587, BG-1000 Sofia C)
- 23 - 29 Internaciaj Feriaj E-Kursoj, Helsingör, Danlando (E. Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingör)
- 23-05/8 11a Internacia Pedagogia Renkontiĝo de FIMEM (RIDEF), Aarjang, Svedio (J. Marin,

- 9 rue Adrien Lejeune, F-93170 Bagnolet, Francio)
- 23-12/8 Kulturaj Aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 26 Publikigo de la Unua Libro de Esperanto en 1887
- 29-05/8 63a Universala Kongreso de Esperanto, Varna, Bulgario
- 30-12/8 Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio (Loka grupo de ĈEA, CS-674 01 Třebíč)

## Aŭgusto

- 1 - 31 (?) Internacia Junulara Esperantista Laborbrigado, Jugoslavio (JEJA, V. Pelagica 8/1, YU-71000 Sarajevo)
- 06 - 12 2a Najbarlanda E-Renkonto, Primošten, Jugoslavio (Kroatia E-Ligo, Amruševa 5, YU-41000 Zagreb)
- 06 - 27 4a Sesio de Someraj Universitataj Kursoj, Lieĝo, Belgio (SUK, Pf. 9, B-4000 Liège)
- 08 - 15 12a Internacia Konferenco de ILEI, Nowy Sacz, Pollando (ILEI, O. Olsen, Bantorget 3, S-222 29 Lund, Svedio)
- 12 - 15 Esperantaj seminarioj kaj kursoj, Siga-gubernio, Japanio (KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka, Oosaka-hu, 561 Japanio)

## LUNDE

**Berno** 19.00 — 19.15: 75,28/3985 48,66/6165 31,46/9535  
ripetota marde kaj jaŭde

## MARDE

**Ibra radio** 21.30 — 21.45: 50,08/5990

**Berno** 22.35 — 22.45: ondoj kiel lunde; ripeto

## MERKREDE

**Berno** 19.00 — 19.15: ondoj kiel lunde; ripetota vendrede kaj sabate

## ĴAŬDE

**Berno** 22.35 — 22.45: ondoj kiel lunde; ripeto

## VENDREDE

**Berno** 19.00 — 19.15: ondoj kiel lunde; ripeto

**Pekino** 21.00 — 21.25: 47/ 43/ 31/

## SABATE

**Zagrebo** 00.05 — 00.20: 265/1960

**Vieno** 17.45 — 17.55: 48,74/6155  
ripetota dimanĉe

**Pekino** 21.00 — 21.25: ondoj kiel vendrede

**Berno** 22.35 — 22.45: ondoj kiel lunde; ripeto

## DIMANĈE

**Vatikana Radio iam inter la** 00.15 kaj 00.45: 169/1529 48,47/6190  
dum muzika programo

**Vieno** 06.45 — 06.55: ondo kiel sabate; ripeto

**Radio Roma** 21.00 — 21.20: 50,08/5990 41,24/7275 30,90/9710

**Vatikana Radio** 21.05 — 21.15: 196/1529 48,47/6190 41,38/7250 31,10/9645

Memoru, ke la mallongaj programoj povas iom varii je horo kaj daŭro.

Konstrui per

# YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



# YTONG AB

YKHULT GRUPPEN

## Jarraporto de SEF rakontas pri hieraŭ

Aperis nova jarraporto pri la agado de SEF, tiu por la jaro 1977. Ĝi estas, kiel kutime, sufiĉe detala kaj enhavas informojn pri la ĉefa agado kaj de la federacio kaj de la kluboj.

SEF ne povis registri kreskon de la membronombro, sed ankaŭ malkreskon ne. Post iom da kresko dum la lastaj jaroj la nombro stabiligis je 1700 membroj. Ne malbone, sed ankaŭ ne kontentige bone. Ni povas esti pli multaj kaj ni devas klopodi fariĝi pli multnombraj.

La financa flanko estas malpli hela. La defcito por la jaro estas je pli ol 10 000 kronoj. La estraro antaŭvidis tion jam komence de la antaŭa jaro, tial ĝi entreprenis altigon de la membrakotizoj kaj establon de *Klubo Cent*. Tiuj ĉi agadoj helpas la ekonomion en 1978. Por la unua fojo SEF ĉijare ricevis subvenciojn por la membrogazeto *La Espero*. Ankaŭ tio helpas al la ekonomio.

*La Espero* kaŭzis parte la pli grandajn elspezojn, ĉar ĝi dum 1977 aperis per ok numeroj, anstataŭ ses pli frue (du numeroj aperis kune). Sed tiun plikostigon plene rekompencas la ŝtata subvencio.

Aperis iom da novaj informiloj. En plej granda kvanto (55 mil ekzempleroj) aperis speciala numero de *Esperantonytt*, de kiu ĉirkaŭ 40 000 distribuigis. Nova estis ankaŭ afiŝeto en du malsamaj formatoj (A4 kaj A3) kaj informa broŝuro en la malta lingvo, kiun SEF eldonis por uzo de Malta Esperanto-Societo. Represitaj estis faldfolio kvarpaĝa (*Valet av internationellt språk är en fråga om jämlikhet*), en pluaĵ 10 000 ekzempleroj. Tio estas jam la tria aŭ kvara eldono de tiu populara faldfolio.

Al la kampo informado apartenas ankaŭ gazetartikoloj. Ni jam plurfoje atentigis en *La Espero* pri la vere riĉa 'rikolto' de gazetartikoloj dum la pasinta jaro. La ĉefaj temoj, kiuj kaŭzis tiujn artikolojn estis la jenaj: prelegvojaĝo de pastro Ciccanti el Italio, la esperantokongreso sur Islando, ekspozicio de infandesignaĵoj kolektitaj de la asocio Radda Barnen en Tibro kunlabore kun la esperantoklubo de Skövde kaj je ioma grado ankaŭ la 90a datreveno de esperanto.

**SPECIALAJ KONFERENCJOJ**  
Depost iom da tempo SEF organizas en la aŭtuno specialajn renkontiĝojn, kiujn oni nomas konferencoj. Estas relative malgrandaj aranĝoj, kun nur dudeko da partoprenantoj, sed dum ili oni pritraktas kelkajn specialajn kampojn de agado. En 1976 okazis tia 'konferenco' pri gazetartikoloj, pasintjare pri edukado de kursgvidantoj. La celo de tiuj konferencoj estas veni al konkretaj rezultoj, kiel plibonigi la agadon sur tiu kampo.

## Proponoj al SEF pri morgaŭa agado

Dum la jarkunvenoj oni ne pri-diskutas nur la faritan agadon, sed ankaŭ la farotan. En Uppsala oni devos i a decidi pri kelkaj proponoj, kiujn diversaj kluboj prezentis.

La unua propono estas de la estraro kaj ĝi temas pri la statuto. La estraro siatepe ricevis la taskon redakti kelkajn esprimojn de la statuto. Ĝi volas nur scii, ĉu ĝi interpretis la taskon korekte je unu punkto. Tiu propono certe ne kaŭzos grandan diskuton.

Pli interesa, kaj esence pli gra-

la esperantoklubo de Kungälv deziras havi la subtenon de SEF por sia propono.

Temas pri la infanaj kongresetoj. Laŭ la nunaj partoprenreguloj nur malmultaj povas kandidati por partopreni en la infanaj kongresetoj. La proponantoj opinias, ke oni povus pli aktive uzi la kongresetojn por instrui esperanton al la infanoj. Pro tio la kongresetoj devus eble daŭri pli longe ol nur unu semajnon. Oni devus ankaŭ ŝanĝi la regulojn rilate al la kosto de la aranĝo, simile kiel kelkaj aliaj organizoj jam faras. Por tia agado oni povus ricevi subvenciojn de la ŝtato.


La kvara propono venas de la klubo de Västerås. Laŭ ĝi SEF skribu al la Nordlanda Konsilantaro kaj proponu, ke ĝi pri-esploru la taŭgecon de esperanto por sia interna uzo.

La proponantoj konstatas, ke svedoj kaj norvegoj ĝenerale ne havas malfacilaĵojn interkompreniĝi, same kiel la norvegoj kaj danoj ne havas. Ili ankaŭ konstatas, ke la danoj ĝenerale bone komprenas la svedojn, dum la svedoj ne bone komprenas la danojn. Sur Islando kaj la Feroaj insuloj oni ĝenerale bone komprenas la danan, sed estas malbone komprenataj de la svedoj.

La escepto estas la finnoj, kies lingvo tute malsimilas al la aliaj nordiaj lingvoj. Uzi la anglan por la interkompreniĝo en la Nordlanda Konsilantaro estus, laŭ la proponantoj, signo de malvenko: bezoni ekuzi eksternordian nacian lingvon por tio. Tial oni enkonduku esperanton por sia interna uzo kaj provu konvinki aliajn internaciajn organizojn, kun kiuj la Nordlanda Konsilantaro kunlaboras, fari la samon.

En la kvina, nur tri liniojn longa propono, la esperantoklubo de Uppsala proponas, ke la estrarmandatoj de estraranoj de SEF estu limigitaj al la daŭro de, ekzemple, dek jaroj.

Kion la estraro opinias pri la ĉilasta propono estas ne tute klare, ĝi nur mencias, ke la statuto de SEF ne havas indikon pri longeco aŭ mallongeco de la oficaĵa periodoj. Eble okazos granda diskuto pri tiu demando, eble tute ne. Tiuj, kiuj venos al Uppsala plej rapide informiĝos pri tio.



**Du kajoroj prezentas al la delegitoj ĉe la jarkongreso de SEF en Uppsala la jarraporton por 1977 kaj proponojn por diskuto.**

### FINVORTOJ

Ni citu la finvortojn de la jarraporto:

«La ĉefa impresio pri 1977 estas, ke la rezulto de la informa agado iomete pliboniĝis. Aperis iom pli da gazetartikoloj kaj venis iom pli da informpetoj ol la jaron antaŭe. Kiel kutime la kluboj kaj iliaj laboroj estas unu el la bazoj de la agado.

Montriĝis bezono pripensi, en kiun direkton ni uzu niajn fortojn dum la plej proksimaj jaroj. La klubo de Stokholmo invitis al Universala Kongreso en 1980 kaj tio prenos multajn fortojn de la federacio. Samtempe necesas memori, ke la laboro devas daŭri ankaŭ en 1981. Se eble, tiu kongreso efiku kiel fortigo de la ĝenerala agado. Tial la estraro komencis diskuti plurjaran laborplanon.»

va estas la dua propono, kiu venis de la esperantoklubo de Jönköping. La klubo proponas, ke SEF dungu vojaĝsekretariojn. Similaj proponoj estis prezentitaj multajn fojojn pli frue, sed neniam akceptiĝis pro ekonomiaj kaŭzoj. Ĉu tiu ĉi propono havos pli pozitivan akcepton?

La klubo informas, ke la sveda sekcio de KELI antaŭe dum multaj jaroj havis vojaĝsekretariojn, eĉ dum 25 jaroj, sen ke tio kostu al la organizo.

La tasko de la sekretario estus viziti klubojn, politikistojn, lernejojn kaj prelegi pri fremdaj landoj. La tasko povus esti plentempa aŭ duontempa; la klubo proponas ankaŭ, ke eble pluraj dividu la taskon inter si (ekzemple pensiuloj) kaj agu distrikte.

La tria propono estas direktita al UEA, sed la proponanto,